

MENSOGO POST MENSOGO

Mensogo estas la efika ilo de satano. Oni mensogas ĉie, ne nur inter maldekstruloj. Ni havas la duan cirkuladon de informado, do ni devas eklerni aŭtentigi ĉiun informon kaj pensi memstare, samtempe ankaŭ rilate al Evangelio.

Mensogo n-ro 1

Akoho estas por homoj

Ĉu vere? Akoho neniigas la ĉelojn de cerbo, malebligas la ĝustan pensadon, gvidas al psikaj malsanoj kaj psikozoj, malgrandigas inteligentecon, kaŭzas genetikajn ŝanĝojn de la fetoj kaj kripligas idaron nomatan FAS Feta Akohola Sindromo (Fetal Alcohol Syndrom), detruas ovĉelon ktp. Ĝi difektas koron, hepton, kaŭzas kanceron, estas ŝtelisto de pene gajnita salajro. Do, pro kio ĝi estas por homoj?

Satano tiel volas, ĉar li volas la fizikan kaj spiritan morton de homo. Kaj ni ripetis laŭ li en katolikaj informiloj: Akoho estas por homoj.

Mensogo n-ro 2

Akoho estas por plenkreskuloj

La menskapto de satano. Oni diras al infanoj, ke al ili estas malpermesate trinki akoholon, ĉar akoho estas nur por plenkreskuloj. Ni inokulas al ili informon, ke kiam ili estos plenkreskaj, ili povos trinki akoholon. Ni instigas infanojn tosti kun suktrinkaĵoj, por ke ili konu ĉi tiun geston, kaj kiam ili plenkreskiĝos, ili povos proponi ĝin kun vodko. En ĉeesto de infanoj ni proponas tostojn kun vodko kaj ni tion nomas kultura drinkado.

Mensogo n-ro 3

Kultura drinkado

Ne ekzistas la kultura drinkado. Ĝi estas plua mensogo. Ĉiu drinkado signifas enkondukon al korpo tokson. La kultura drinkado direktas al troigado, kaj pli poste al alkoholismo. Ni ne falas en malsanon tuj. La alkoholismo estas la metabola malsano, elvokita

per la drinkado de akoho. Ĉe la inklinoj, do la genetica akoholdependeco, ni fariĝas akoholuloj. Tiel do estiĝas akoholuloj kulture drinkantaj, tiel estiĝas al infanoj de akoholuloj aŭ indianoj en Ameriko aŭ eskimoj, kiuj ne posedas iujn enzimojn en korpoj kaj estas do malsanaj post kelkfoja ektrinko de akoho. Do ni falas en brakumon de la malsano senkonscie, senpripense, kun la instigo aŭ aprobo de familio kaj amikoj, kun obeo al reklamoj de akoho, troa ĝia produkto kaj oferto. Satano ŝatas la akoholan malsanon, kiu deprenas al homoj menson, ĉar per akoho li povas nin pli facile regi. Ŝtato ankaŭ ŝatas regi drinkemajn civitanojn, ĉar ili ne ribelas, kiam io malbone okazas en ŝtato. Estas enkondukata limigado de laktprodukto, sed estas nenia limigo por produkto de akoho kaj nenia limigo por ĝin vendi. Satano ĝojas, ĉar ĝi rikoltas grandajn fruktojn en perforto, rompitaĵoj, memmortigoj, krimoj kaj akcidentoj.

Mensogo n-ro 4

Estas nenia medikamento kontraŭ alkoholismo

Tio estas mensogo. Ekzistas sekuraj kuraciloj, konataj en la tradicio de medicina herbaro ek de centoj da jaroj, herbaj farmakologiaj terapioj, kiuj laŭ universitataj esploroj helpas malpligrandigi la trouzon de akoho je 90 % kaj regeneracias la korpajn organojn lezitaĵojn per akoho.

Kial ni ne scias pri tio? Satano ne volas liberiĝadi de akoholuloj, ili ja estas lia ilaro, sed ili estas samtempe bonegaj klientoj de la akohola industrio. Ili fordinkas la lastan moneron, aŭ eĉ priŝtelos ĝin, por aĉeti akoholon.

La helpa ilo en la batalo kontraŭ alkoholismo estas la radiko de Kudzu. Farede penado de poloj en Kanado Kudzu Root aperis antaŭ 15 jaroj en apotekoj de Pollando. Sed tion malriĉaj drinkuloj kaj iliaj familioj ne scias. Kiel estas tio ebla, ke ĉi tiun vegetalon eĉ ne rimarkis la plej piaj homoj kaj pastroj? Ili estas alkutimitaj al ekzistanta mensogo, ke alkoholulo devas mem kuraci sin per forta volo kaj ili kredas, ke estas nenia medikamento kontraŭ alkoholismo. ■

*Bożena Smólkowska
El revuo Michael 80/2015 esperantigis Stanisław Śmigielski*